

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

I marto 1905

A. Gautier : La vegetala dieto (resumis HENRI RAMIER) (<i>fino</i>)	97
Leo Belmont : Kiam do reĝo iris batali . . . (poemo de <i>M. Konopnicka</i>).	103
Sven : Kristo kaj Sankta Petro (de <i>Selma Lagerlöf</i>)	104
Miksaĵoj : Moderna batalo. — Internacia konferenco. — Tro bona! — Por filatelistoj — Bagateloj	110
Tra la mondo Esperantista : Otto Lamm : La internacia delegitaro por Por elekto de helpa lingvo ; ĝiaj progresoj en 1904	113
Movado Esperantista	117
Letero de Doktoro Zamenhof	118
Diversaĵoj. — L. de Beaufront : Spiono — spionanto	118
Cikado, cigado, cikalo	119
Goeleto.	119
Komunikaĵoj	119
Problemoj	120

Nia aldono literatura (49—60 paĝoj) : Perdita kaj retrovita, originala rakonto de *Émile Boirac*.

La vegetala dieto

II

(*Daŭrigo.*)

Ni vidis la bonajn flankojn de la vegetala dieto ; ni analizu nune ĝiajn malbonaĵojn.

Oni scias hodiaŭ, ke la ĉiutaga normala porcio da nutraĵo necesa por plenkreska homo, en meza Eŭropa klimato, devas konsisti en almenaŭ 80 gramoj da albuminaĵoj, se la nutriĝanto ripozas ; se li forte laboras, tiu ĉi kvanto devas pligrandiĝi kaj atingi 150 gramojn ; plie, estas necese, ke la albuminaĵoj estu akompanataj per ĉirkaŭ kvarobla pezaĵo da « trielementaj » aĵoj (amelaĵoj aŭ grasaĵoj). Tiuj ĉi kvantoj estas tiuj, kiuj estas absolute necesaj por liveri la forton kaj varmon bezonatajn kaj por ripari la azotan perdaĵon.

Oni do devos iamaniere ajn trovi ĉiutage tiun ĉi kvanton da nutraĵo — kia ajn estas la nutra sis-

temo — se oni volas bone farti, kiam oni estas eŭropano kaj vivas en la meza klimato de Eŭropo. Se oni sekvas dieton absolute vegetalan, certe, oni povas trovi tiun ĉi kvanton en pano, legomoj kaj fruktoj; sed en tia okazo oni devas ensorbi grandegan mason da manĝaĵo. Ni konsentu, ke oni devas ensorbi ĉiutage kaj meznombro 100 gramojn da albuminaĵoj; jen estas, laŭ miaj esploroj, la maso da ordinaraj manĝaĵoj, kiun oni devos englutadi:

	Pezo	Enteno	
		Albuminaĵoj	Grasajoj kaj amelaĵoj
Pano	1205 gramoj	100 gramoj	562 gramoj
Terpomoj	7690 —	100 —	1536 —
Fazeoloj	512 —	100 —	240 —
Pizoj	464 —	100 —	240 —
Faboj	424 —	100 —	245 —
Kaŝtanoj	1661 —	100 —	617 —
Salatoj	7142 —	100 —	170 —
Ĉerizoj	14300 —	100 —	2140 —
Pomoj	25000 —	100 —	1750 —

Sekve, 1 kil. 205 gr. da pano, 7 kil. 600 gr. da terpomoj, 1 kil. 661 da kaŝtanoj, ĉirkaŭ 7 kilogramoj da salato, 25 kilogramoj da pomoj, k. t. s. estas necesaj por ĉiutage liveri al ni la 100 gramojn da albuminaĵoj, kiujn ni nepre bezonas por kompensi nian azotan perdaĵon. Tiamaniere sin nutradi estas neebla. Mi scias, ke oni povas uzi pli favorajn kombinaĵojn: mikso de 603 gramoj da pano kun 222 gramoj da faboj liverus 100 gramojn da albuminaĵo kaj 403 gramojn da trielementaj aĵoj ĉe tre modera pezo (nur 815 gramoj) da manĝaĵo ĉiutage. Simile 1 kilogramo da terpomoj kaj 450 gramoj da fazeoloj liverus 100 gramojn da albuminaĵoj kaj 395 gramojn da trielementaĵoj. Simila kombinaĵo de pano, aŭ pli ĝuste de faruna kaĉo

kun faboj kaj pintopizoj, estis preskaŭ la sola nutraĵo de la popoloj de antikva Italujo, la *pulmentum* de tiuj malnovaj Latinoj, kiuj almilitis la mondon. Ankoraŭ nuntempe, ĝi sufiĉas je kelkaj laboristaj societoj. La kampkulturistoj en *Siebenburger* (Germanujo) sin nutradas preskaŭ nur tiamaniere, eĉ en plej laciga tempo de la rikolto (ÖHLMÜLLER, *Zeitschr. für Biolog.*, Bd XX, p. 393).

Sed escepte en la okazoj, kiam forta laborado kaj lacigo en libera aero sufiĉas por spicumi la manĝon, oni ne povas ĉiutage uzi la saman nutraĵon, eĉ se ĝi estas tre nutrema. La vegetalista inklinas do sin turni, krom pano kaj sekaj legomoj, al aliaj vegetalaĵoj : fruktoj, tuberkloj kaj herbecaj legomoj, malriĉaj nutraĵoj, kiuj povas liveri la bezonatan kvanton da albuminaĵo nur per grandega maso da manĝaĵo, ĉar, por ricevi 100 gramojn da albumino, oni devas trakti 3 kilogramojn da spinaco, 7 kilogramojn da salato, iom pli da terpomoj, 14 kilogramojn da ĉerizoj, ktp.

De tio sekvas, ke, por trovi vegetalan nutradon samtempe sufiĉan kaj diversan, la vegetalista devas ensorbi grandegajn masojn da nutraĵo. Tio ĉi lacigas la stomakon kaj la digestan aparaton, kiu estas embarasata de amaso da neutiligeblaj aĵoj, precipe amelecaj kaj ĉelaj; tial la intesto lacigas, senfine aliigante, apartigante, kaj forĵetante tiujn senutilaĵojn.

La digesta aparato de la herbistaj bestoj estas konstruita por digesti la vegetalaĵojn; la digesta aparato de la homo ne taŭgas por tio ĉi. Cetere la eksperimentoj de RÜBNER kaj aliaj scienculoj elmontris, ke la albuminaĵoj el vegetala deveno ne estas utiligataj de la homa intesto tiel bone, kiel la albuminaĵoj el besta deveno; kaj pro tio ĉi oni devus ankoraŭ pli grandigi la supre kalkulitajn kvantojn almenaŭ je 10 aŭ 15 %.

III

Estas vere, ke oni povas plibonigi la absolutan vegetalan dieton, aldonante al ĝi nutraĵojn devenintajn de bestoj, ekzemple buteron, lakton, grasajon, ovojn, eĉ sen mikso de viando. Tio ĉi estas la « miksa vegetala dieto »; ĝi estas la senvianda nutrado de la katolika vendredo, de la rusa fastado, de multaj monaĥoj en ĉiuj landoj kristanaj, mahometanaj aŭ budhanaj; ĝi estas la sola dieto permesata de la religio al la tri superaj kasto en Hindujo. Tiu ĉi nutrosistemo estas pli logika ol la antaŭe vidita, kaj havas samtempe la bonajn ecojn de la miksa ordinara nutrado kaj de la absoluta vegetala dieto. La jenaj nombroj montras, ke ĝi estas sufiĉe praktike uzebla :

<i>Kvantoj</i>	<i>Enteno</i>	
	<i>Albuminaĵoj</i>	<i>Trielementaĵoj</i>
Pano 500 gr. kaj lakto 1200 gr.	100 gr.	376 gr.
Pano 800 gr. kaj fromaĝo 103 gr.	100 gr.	401 gr.
Pano 800 gr. kaj ovoj 268 gr.	100 gr.	400 gr.

Sekve, unu funto da pano kaj iom pli ol unu litro da lakto, 800 gramoj da pano kaj ĉirkaŭ 100 gramoj da fromaĝo aŭ 270 gramoj da ovoj, liveras, kune kun la necesaj 100 gramoj da albuminaĵo, 375 aŭ 400 gramojn da trielementaĵoj; tiaj proporcioj estas tre kontentigaj ĉe tre ordinara kvanto da nutraĵo.

Oni do ne povas prave riproĉi al la miksa vegetala dieto, ke ĝi tro ŝarĝas la stomakon kaj inteston per aĵoj neutiligeblaj, kiel faras la senmiksa vegetala nutrosistemo. Se oni aldonas al la pano, ovoj, amelecaj legomoj, pli akvoriĉajn manĝaĵojn, kiel fruktojn aŭ herbecajn legomojn, tiel la ĉiutaga pezo de la manĝaĵo pligrandiĝos, sed la kvanto da necesa trinkaĵo malgrandiĝos kaj la stomaka troŝarĝado ankaŭ ne ekzistos.

La miksa vegetala dieto povas aliparte esti tre diversa, dank' al la lakto, grasaĵoj, fromaĝoj, ovojn, ktp.; ĝi do estas tre logika, tre akceptinda dieto, kiun oni povas kaj eĉ devas uzi ĉe kelkaj malsanaj okazoj, kiam oni devas aliigi diversajn malbonajn statojn de la homa korpo. Al ĝi ankaŭ oni devas sin turni, kiam oni devas fleksebligi la karakteron de personoj aŭ popoloj. For de tiu celo ŝajne nin forpelas niaj nunaj moroj kaj nunaj necesaj aŭ inklinoj, sed al tiu celo ni pli-malpli baldaŭ turnos nin, eĉ se ni tion faros nur pro nia propra intereso kaj pro bone komprenita sociala progreso. Tion komprenis la vegetalistaj societoj kaj por tio ili varme batalas, kvankam ĝis nun sen granda sukceso.

Oni plej ofte kontraŭdiras, ke la vegetala dieto malgrandigas la korpan kaj spiritan energion. Mi jam supre montris tion, kion oni devas pri tio opinii. Mi konsentas, ke en la nuna stato de niaj kutimoj kaj pro la heredeco, kiu nin premeblas, vianda manĝo subtenas nin pli multe ol senvianda. Sed ni devas respondi tiun ĉi gravan demandon ne per ŝajna solvilo. La korpa forteco kaj la sano de la popoloj, kiuj en Eŭropo sin nutras viande, ne estas superaj je tiuj de la najbaraj popoloj, kiuj nur tre malmulte aŭ preskaŭ neniam uzas viandon. Pri la spirita energio, ĝin ne povas mezuri la sola almitemo. La karaktero estas malsimpla aro farita el diversaj elementoj : pacienco, persistemo, kuraĝo, celo al supera idealo... La dezirinda spirita stato sidas meze inter la atakema egoismo de la raso aŭ de la homo precipe manĝisto de viando, kiu iras rekten antaŭ si, kaj haltas aŭ ŝanceliĝas pro nenio ajn — kaj la pasiva energio de la Hinduo, manĝisto de rizo, kiu akceptas sian sorton kaj maltrankviliĝas pri la vivado de la bestoj pli ol pri sia propra. La nutrosistemo de la

unua puŝas lin al perforto kaj trouzo de sia fortikeco kaj al milito; la dieto de la dua puŝas lin al la pacegemo kaj pasiveco : *In medio stat virtus.*

La absoluta vegetala dieto ne taŭgas. Miksite kun azotaĵoj tiritaj el bestoj senmortige, ĝi estas logika kaj sufiĉa. En multaj okazoj, se ĝi anstataŭus nian modernan, preskaŭ absolutan viandan dieton, ĝi malaperigus multajn malsanajn kronikajn statojn hodiaŭ konfuzatajn sub malklaraj nomoj « sanga, nerva, artritisma, malfortika konstitucio » ktp. Ĝi estas la dieto de la saĝulo kaj antaŭvidulo. « La homo, diris Cuvier, estas nek viando- nek herbomanĝulo. Li posedas nek la dentojn de la remanĝulo, nek ĝiajn kvar stomakojn nek ĝiajn intestojn . . . Se oni konsideras liajn dentojn kaj intestojn, la homo estas nature kaj devene frukto-manĝulo, kiel la simio. »

IV

Ni konkludas : la absoluta senmiksa vegetala dieto ne bone respondas la bezonojn kaj interesojn de niaj eŭropaj raso; ĝi ne taŭgas por niaj organoj. Moderite per kunmikso de lakto, graso, butero, fromaĝo, ovo, ktp., ĝi prezentas gravajn bonajn flankojn : ĝi malacidigas la sangon, reguligas la sangiradon, konservas la elastecon de la arterioj, akcelas la oksidiĝojn, malmultigas la azotajn organajn restaĵojn kaj la venenaĵojn, kaj tiel faciligas la hepaton. Multe malpli ol la ordinara nutrosistemo (precipe kiam oni manĝas tro multe da viando), ĝi elvokas haŭtajn malsanojn, artritismon, arterio-sklerozon, kongestojn de la internaj organoj. Ĝi emas plibonigi la karakterojn, fari nin kvietaj pli ol febrecaj, atakemaj aŭ perfortemaj. Ĝi estas praktike uzebla kaj logika. Ĝi do devas esti akcep-

tata, eĉ rekomendata, se oni celas al formado kaj edukado de rasoj malkruelaj, inteligentaj, artemaj, pacemaj, — kaj tamen multiĝemaj, fortikaj kaj agemaj.

Armand Gautier

Profesoro en la Pariza
Medicina Fakultato

Resumis HENRI RAMIER

Kiam do reĝo iris batali...

El poezioj popularaj de Marja Konopnicka

Kiam do reĝo iris batali,
Trumpetoj oraj ludadis al li,
Ludadis al li trumpet' el oro,
Por ke li venku brava kun koro...

Kiam do Staĉjo iris batali,
Nur riveretoj bruetis al li,
Bruis en kampo nur oraj spikoj,
Pro la sopiro, pro sortaj pikoj.

Kaj en milito kugloj fajfegas
Kaj kvazaŭ garboj homoj falegas;
Plej brave batas reĝ' kaj reĝanoj,
Tre dense falas la vilaĝanoj.

Standardaj agloj plaŭdas plej forte,
Krakas do ie Brust' vilaĝana.
Ha! Staĉjo estas vundita morte,
La reĝ' kortegon revenas sana.

Dum li eniris pordojn el oro,
Iris renkonten bela Aŭroro,
Ĉiuj soniloj ludis salute,
Oni forgesis la perdojn tute...

Dum oni tombon Staĉjan fosadis,
Nur malproksime arboj bruadis,
Kaj nur mallonge sub ventoj piaj
Sonis la sonoriloj liliaj...

Esperantigis Leo Belmont

Kristo kaj Sankta Petro

— De Selma Lagerlöf —

Estis en la tempo, kiam Kristo kaj Sankta Petro ĵus eniris la Paradizon post longa vagado sur la tero kaj suferrado de multaj mizeroj.

Kiel ĝojis sankta Petro, oni povas imagi! Vere estis alia afero, sidadi en la Paradizo kaj rigardi la mondon, ol iradi de domo al domo, kiel almozuloj. Estis alia afero, promeni en la Paradizaj ĝardenoj, ol vivadi sur la tero, kie li ne sciis, ĉu ili trovos ŝirmejon dum fulmotondra nokto aŭ devos daŭrigi la iradon tra la mallumo kaj malvarmo!

Imagu la ĝojon ĉe alveno en tian ripozejon post tia vojaĝo! Tre ofte sankta Petro estis pensinta, ĉu tio finiĝos bone. Kontraŭvole li dubis kaj maltrankviligis, ĉar la malfeliculo ne povis kompreni, kial ĉio estas al ili tiel malfacila, dum la Sinjoro estas la mastro de la mondo.

Kaj nun jam neniu persekutis lin. Imagu lian ĝojon.

Nun li povis ridi memorante la suferojn toleritajn de Kristo kaj de li mem; memorante, kiel ili devis sin kontentigi per malmulto.

Unu fojon, ili estis en tiel mizera stato, ke li ekmurmuris, ne kapablante plu toleradi tian vivadon. Kristo tiam kunkondukis lin kaj ili komencis supreniri monton. La Majstro ne klarigis al li sian celon.

Jam ili preteriris urbojn konstruitajn ĉe piedo de la monto, kaj kastelon pli supre starigitan. Ili preteriris vilaĝajn domojn kaj paŝintajn kajutojn, kaj postlasis la lastajn hakistajn rifuĝejojn.

Fine ili alvenis en lokon, kie la monto estas nuda, senarba, senkreskaja, kie dezertulo starigis kajuton por eraringintaj vojaĝantoj.

Ili trairis neĝajn kampojn, kie dormas marmotoj; atingis glaciejojn, kie apenaŭ povas paŝi ĉamoj.

Tie, Kristo trovis sur neĝo malgrandan ruĝgorgon mortintan pro malvarmo kaj ĝin prenis sur sian bruston. Kaj sankta Petro memoris, ke li pensis, ĉu ili manĝos la birdon tagmanĝe.

Dum kelka tempo ili paŝis sur la glacio, kaj al sankta Petro ŝajnis, ke neniam ili venis tiel al la regejo de la Morto,

ĉar vento malvarma, kiel la Morto mem ilin surblovis, nebulo malluma, kiel la Morto, ilin ĉirkaŭprenis. Tiel malproksime, kiel ili povis vidi, nenio ŝajnis viva. Kaj tamen ili estis nur ĉe la duono de la monto.

Kaj tiam li demandis Kriston, ĉu ili baldaŭ returnen iros?

— Ne tuj, respondis Kristo, ĉar mi volas al vi montri ion, kio donos kuraĝon por eltoleri ĉiujn ĉagrenojn.

Kaj tiel ili ankoraŭ marŝis tra la mallumo kaj malvarmo ĝis ili atingis altegan muron, kiu elbaras la vojon.

— Tiu ĉi muro sidas ĉirkaŭ la tuta supro, diris Kristo, kaj vi ne povus superiri ĝin en kia ajn loko. Neniu el la vivantoj povas vidi la transaĵon, ĉar tie estas la Paradizo, kie loĝas animoj de la Feliĉuloj.

Sed sankta Petro ne povis montri kredantan mienon.

— Ne estas tie malvarme kaj mallume, kiel ĉi tie, diris Kristo; sed regas somero kaj brilas helaj radioj de la suno kaj de la steloj.

Kontraŭvole sankta Petro ne kredis.

Tiam Kristo prenis birdeton trovitan sur la glacio; li klinis sin posten kaj ĵetis la birdon super la muron, ke li falu en la Paradizon.

Kaj sankta Petro tuj aŭdis gajan pepadon, kiun li elkonis, kiel ruĝgorĝan pepadon, kaj li tre miris.

Li sin turnis al Kristo kaj diris :

— Ni reiru sur la teron kaj toleru ĉion tolerotan, ĉar mi vidas, ke vi pravas kaj ke ekzistas loko, kie la Vivo venkas la Morton.

Kaj ili malsupreniris la monton kaj daŭrigis sian iradon.

Post tiu tempo, sankta Petro nenion alian konis el la Paradizo, sed li ĉiam deziris vidi la lokon sidantan trans la muro. Kaj nun li estis en ĝi kaj nenion pli deziris. Li ĉerpis ĝojon el ĉiam pli liveremaj fontoj.

Sed ne ankoraŭ pasis dek kvar tagoj de la tago, kiam li eniris la Paradizon, kiam anĝelo aliris Kriston, sidantan tie, sepfoje sin klinis antaŭ li kaj sciigis, ke granda malfeliĉo kredeble surprimas sanktan Petron. Li volis nek manĝi nek trinki kaj liaj okuloj havas ruĝan ĉirkaŭon, kvazaŭ li ne dormis dum kelkaj noktoj.

Tion aŭdinte, Kristo tuj starigis sin kaj ekserĉis sanktan Petron. Li trovis lin en angulo de la Paradizo, kuŝantan, tro

malĝojan por stari, kun disŝiritaj vestoj kaj cindro sur la kapo.

Vidante lin tiel ĉagrenatan, Kristo eksidis teren apud li kaj alparolis tute same, kvazaŭ ili vivadus ankoraŭ ĉe la surteraj mizeroj.

— Kio faras vin tiel malfeliĉa, Petro? demandis Kristo.

Sed la ĉagreno tute malvigligis sanktan Petron, tiama-niere, ke li neniel povis respondi.

— Kio faras vin tiel malfeliĉa, Petro? duafoje demandis Kristo.

Kiam Kristo rediris sian demandon, sankta Petro deprenis de sia kapo sian oran kronon kaj ĵetis ĝin al piedoj de sia Majstro, kvazaŭ, montrante, ke li rifuzas la honoraĵojn al li donacitajn.

Sed Kristo bone vidis, ke sankta Petro estas tro ĉagrenata, por konscii, kion li faras. Li tute ne koleras kontraŭ li.

— Fine diru tion, kio al vi kaŭzas tiom da ĉagreno? li diris tiel afable, kiel antaŭe kaj per pli amika voĉo.

Sankta Petro starigis sin, kaj Kristo vidis ke ne nur li estas sen espero, sed ke li koleras. Li alproksimigis sin al Kristo, kun fermitaj pugnoj, brilegaj okuloj.

— Nun mi volas esti forpermesata de via servado, diris sankta Petro. Mi ne povas resti pluan tagon en la Paradizo.

Kristo klopodis kvietigi lin, kiel li faris tiel ofte, kiam sankta Petro murmuris.

— Vi estos forpermesata, li diris; sed unue diru tion, kio ofendas vin.

— Mi povas diri, ke mi atendis pli bonan rekompencan, kiam ni ambaŭ suferis ĉian ajn mizeraĵon sur la tero, respondis sankta Petro.

Kristo vidis, ke la koro de sankta Petro estas plena de maldolĉaĵo, kaj li ne incitigis je li.

— Mi diris, ke vi estas libera iri, kien vi volas; nur sciigu min pri tio, kio tiel forte konfuzas vin.

Sankta Petro fine rakontis tion, kio faras lin tiel malfeliĉa.

— Mi havis maljunan patrinon, li respondis, kaj ŝi mortis antaŭ du tagoj.

— Nun mi scias tion, kio vin ĉagrenas, diris Kristo. Vi suferas, ĉar via patrino ne eniris en la Paradizon.

— Jes, tio! respondis sankta Petro; kaj lia ĉagreno tiel forte premis lin, ke li komencis ĝemadi kaj plori.

— Tamen al mi ŝajnas, li daŭrigis, ke mi meritis, ke ŝi venu tien ĉi.

Sed kiam Kristo eksciis, kial sankta Petro tiel forte estas ĉagrenata, li siavice malgajiĝis, ĉar la patrino ne vivadis tiakondute, ke ŝi rajtas eniris la ĉielon. Ŝi celis nur amasi monon, kaj neniam donis pecon da pano al la mizeruloj petintaj almozon ĉe ŝia pordo. Sed Kristo komprenis, ke sankta Petro ne povas konsenti, ke la patrino estis tro avara por esti savata.

— Sankta Petro, li diris, kiamaniere vi povas scii, ke al via patrino plaĉus la ĉi-tiea estado?

— Tion vi diras nur, ĉar vi ne volas plenumi mian peton, diris sankta Petro; kiu ne estus kontenta, vivante en la Paradizo?

— Kiu ne ĝojas pri ĝojo de la aliaj, tiu ne povus esti feliĉa tie. ĉi, rediris Kristo.

— Aliaj ol mia patrino estas, kiuj ne konvenas ĉi-tie.

Kaj Kristo divenis, ke sankta Petro aludas pri ŝi.

Kaj li sentis sin tre malfeliĉa, ke sankta Petro estas kaptita de ĉagreno tiel granda, ke li ne scias plu, kion li diras. Li tie restis kaj atendis, ke sankta Petro pentos kaj komprenos, ke la patrino ne taŭgas por la Paradizo. Sed la apostolo ne volis alimaniere opinii.

Tiam Kristo alvokis anĝelon kaj ordonis, ke li malsupreniru al la infero kaj eltiru la patrino de sankta Petro.

— Permesu, ke mi vidu, kiel li alkondukas ŝin, petis sankta Petro.

Kristo prenis lian manon kaj kondukis lin al roko tute kruda unuflanke. Kaj li montris, ke sufiĉas iom sin klini, por ekvidi la inferon.

Kiam sankta Petro alrigardis, en la komenco li povis nenion vidi pli, ol se li sin klinus super putego. Kvazaŭ profundega fendaĵo malfermiĝis antaŭ li.

La unua afero ekvidita estis malsupreniĝanta anĝelo, kiu sentime sin jetis, nur diŝlargiĝante la flugilojn por ne tro rapide fali.

Sed kiam la okuloj de sankta Petro kutimis la mallumon, li vidis pli kaj pli multajn aferojn. Li vidis, ke la Paradizo sidas sur monto ĉirkaŭata de profundegaĵo, ĉe kies fundo vivadas damnitoj. La anĝelo longan momenton malsupreniĝis

antaŭ ol alveni la fundon; sankta Petro ekteruris, vidante, ke ĝi tiel malproksime estas.

— Ĉu li povos realporti mian patrinon? li diris.

La profundaĵo estis tiel kava, ke la sunaj radioj ne penetris en ĝin kaj tie regis mallumego. Sed la anĝelo kunportis kun si iom da lumo, tiamaniere ke sankta Petro prosperis distingi tion, kio estas tute malsupre.

Estis senlima dezerto. Pintaj ŝtonegoj kovris la teron kaj inter ili sterniĝis nigraj ŝlimejoj. Tie kreskis eĉ ne unu verda herbero, ne unu arbo. Oni ekvidis nenian vivaĵon.

Sed sur tiuj pintaj ŝtonegoj estis la damnitoj. Ili tie sin metis, sin levinte tiel alten, kiel eble, kaj tie restis; ili ne kapablis iri pli alten kaj ili restis ĉe sia loko, rigiditaj pro la senespereco.

Sankta Petro ekvidis kelkajn, kiuj streĉas la brakojn kaj tenadas la okulojn senĉese alten. Aliaj kovris sian vizaĝon per siaj manoj por ne vidi la ĉirkaŭaĵon. Ĉiuj estis senmovaj; neniuj el ili marŝis. Kelkaj kuŝis sur la ŝlimo kaj tute ne penis por sin eltiri.

La plej terura estis, ke tiel multegaj estas la damnitoj. Kvazaŭ la fundo de la profundaĵo konsistis nur el korpoj kaj kapoj.

Kaj sanktan Petron kaptis nova maltrankviliĝo:

— Vi vidis, ke li ne trovos ŝin, li diris al Kristo.

Kristo rigardis lin per samaj malgajaj okuloj. Sankta Petro devus konfidi la anĝelon.

Sed tamen sankta Petro rigardis la anĝelon, kvazaŭ li ne povus trovi la patrinon inter la amasego da damnitoj. Tiu ĉi disvolvis la flugilojn kaj flugis tien ĉi kaj tien, serĉante ŝin.

Subite unu el la malfeliĉaj damnitoj ekvidis la anĝelon. Tiam li starigis sin, etendis al li la brakojn kaj vokis:

— Min prenu, min prenu!

Tiam estis amasa moviĝo. La milionoj da suferantoj en la infero sin aljetis ĉiuj kune, etendis la brakojn kaj petegis la anĝelon, ke li konduku ilin en la Paradizon de la feliĉuloj.

Iliaj krioj altiĝis ĝis Kristo kaj sankta Petro, kaj ilia koro dolore tremis ĉe tia aŭdo.

La anĝelo sin tenadis super la damnitoj, sed dum li flugis kaj reflugis por eltrovi la serĉatinon, ili ĉiuj sekvis lin, tiel ke ili ŝajnis balaataj de ventego.

Fine la anĝelo ekvidis tiun, kiun li devas kunpreni. Li faldis siajn flugilojn kaj falis kvazaŭ fulmo. Kaj sankta Petro ĝoje ekkriis, kiam li vidis, ke li levas sin kune kun si.

— Estu benata, vi, kiu realportas mian patrinon, li diris.

Kristo metis sian manon sur lian ŝultron, kvazaŭ por averti lin je tro frua ĝojado.

Sed sankta Petro estis tuj ploranta pro la ĝojo, ke la patrino estas savata. Li ne povis kompreni, ke io kapablas ilin apartigi. Kaj lia ĝojo pligrandigis, kiam li vidis, ke malgraŭ la rapideco de la, anĝelo, kelkaj damnitoj ankaŭ sin pendigis al ŝi por kune eniri la Paradizon.

Ili estis ĉirkaŭ dekdu tiuj, kiuj sin alkroĉis al la maljunulino; kaj sankta Petro pensis, ke estas granda honoro por la patrino, ke ŝi helpas al tiom da malfeliĉuloj por eliri el la infero.

Cetere la anĝelo faris nenian geston por malhelpi, ke ili sin tenu ĉe ŝi. Li ne ŝajnis eksenti la pezajon kaj ne movis siajn flugilojn pli peneme, ol se li ĉielen portus unu birdeton.

Sed tiam sankta Petro vidis, ke lia patrino komencas forigi la malfeliĉulojn, kiuj sin tenas ĉe ŝi: ŝi prenis iliajn manojn, disigis iliajn fingrojn, tiamaniere ke ili falis en la inferon unu post la alia.

Sankta Petro aŭdis, ke ili petas kaj petegas sin; sed la maljunulino ne ŝajnis toleri, ke alia persono estu savata. Ŝi liberigis sin de ili kaj faligis en ilian mizerejon. Kaj kiam ili falis, la aero pleniĝis per iliaj malpreĝoj kaj malbenoj.

Tiam sankta Petro priĵuris sian patrinon, ke ŝi kompatu ilin, sed ŝi volis nenion atenti kaj daŭrigis kiel antaŭe.

Kaj sankta Petro rimarkis, ke ju pli la pezaĵo estas malgranda, des pli malrapide flugas la anĝelo. Li tiel teruris, ke liaj kruroj fleksiĝis kaj li falis surgenu.

Fine restis nur unu damnito sin ankoraŭ tenanta ĉe la patrino de sankta Petro. Ĝi estis junulino, kiu pendis de ŝia kolo kaj kun la buŝo kontraŭ ŝia orelo, petegis, ke ŝi permesu la eniron en la Paradizon.

La anĝelo estis tiel proksime, ke jam sankta Petro al-etendis la brakojn por akcepti sian patrinon. Al li ŝajnis, ke li bezonas fari nur du flugilbatojn por atingi la monton.

Sed en tiu momento liaj flugiloj tute senmoviĝis kaj lia vizaĝo fariĝis malluma, kiel la nokto.

Ĉar la maljunulino estis metinta la manojn post si, ek-kaptis la brakojn, kiuj ĉirkaŭprenas ŝian kolon, kaj tiradis kiel eble plej forte. Fine ŝi prosperis forigi la ĉirkaŭpremejon kaj liberigi sin de tiu ĉi lasta animo.

Kiam la damnito falis, la anĝelo malsupreniĝis kelkajn futojn, kaj ŝajnis, ke li ne povas plu movi la flugilojn.

Li konsideris la maljunulinon doloresprime; liaj manoj forlasis ŝin kaj li lasis ŝin fali, kvazaŭ ŝi estas tro multepeza nun, kiam ŝi estas sola.

Kaj unusalte li revenis la Paradizon.

Sed sankta Petro silentis longan momenton, kaj ekplorigis. Kristo ĉiam estis apud li.

— Sankta Petro, li diris, mi neniam estus kredinta, ke vi tiel forte ploros dum vi estas en la Paradizo.

La maljuna servisto de Dio levis la kapon kaj respondis:

— Kio estas tio ĉi Paradizo, kie mi aŭdas la plendojn de miaj amatoj kaj vidas la suferojn de miaj fratoj?

La vizaĝo de Kristo pleniĝis je ĉagreno.

— Ĉu mi ne volis al vi prepari Paradizon je senmiksa feliĉo? li diris. Ĉu vi ne komprenas, ke tial mi devas vivadi ĉe la homoj kaj ilin instrui, ke ili amu la aliajn homojn kiel sin mem? Ĉar dum ili tion ĉi ne atingos, estos sur la tero aŭ en la ĉielo ne unu ŝirmejo, kie doloro ne povos ilin frapi.

Esperantigis Sven



MIKSAĴOJ

Moderna batalo. En oktobra *Scribner's Magazine*, S-ro MILLARD, la bone konata amerika militkorespondanto, verkis artikolon pri la Milito Malproksimorienta, en kiu troviĝas jena vivega vortprenajo de moderna batalo:

La sceno dum tiu ĉi terura kanonado estis tipo de moderna militado. Rigardante al japanaj linioj, nenion oni vidis krom brunverdaj deklivoj de montetoj, inter-strekitaj de la pli malhela nuancaro de valoj krudoflankaj. — Tie ĉi aŭ tie, sur la pli malsupraj deklivoj aŭ en la valetoj, nestumis ĝis vi-

laĝo, kun flavaj kotmuroj kaj pajlotegmentoj kontraste reliefataj. Iaj partoj de rivereto, estis markataj per argenta rebrilo. Nenie, en la vidkampo limigata de la montoj estis ia signeto ajn de l'kontraŭbatalantoj. La surdiga bruego de ducent paflegoj, sonanta pro rapidpafa mekanismo kvazaŭ knabo skrapus fortikan bastonon laŭlonge de palisaro, frapegis l'orelon. Sed pli reala, pli palpebla ol la bruego estis la vibrado de l'atmosfero, kiu tremegis sub la frakasado, kiel agordilo, kaŭzante akran, sed ŝajne malproksiman tintadon de l'oreltamburoj. La sonado estis miksata kun la pli proksimaj, pli akraj eksplodoj de bomboj, kaj la raŭka muĝo de ŝrapnelo senkapiĝinta aŭdigis noton aparte distingeblan. Kuglegoj disrompiĝis alte en l'aero, postlasante palebluan ringon da fumo, kvazaŭ iu nevidata spirito blovus sur nevidatan cigaron; aliaj, pli proksime al la tero, disetendis penetrantajn haladzojn kune kun siaj kugletaroj; aliaj resaltadis super la tero, disjetante per sia eksplodo nubon da ŝtonoj kaj polvo. Sed ĉiam nenia kontraŭbatalanto. Bomboj milope disrompiĝas, homoj de ili centope estas mortigataj, sed de kie ili venas?

En tiu ĉi batalo la japanoj uzis ekskluzive la nerektan pafmetodon, kiu estis ebligata pro la longa interspaco kaj sekve la alten leviĝo de la modernaj kampopafiloj. Por la profanuloj, mi klarigos ke nereкта pafado konsistas loki pafilojn post altaĵeto, kaj, levinte iliajn buŝojn ĝis angulo matematike kalkulita, pafi objekton tre malproksiman. Tial, dum la kuglego, kurblinie fluginte, trafis la celon, la trafitoj devigataj rigardi laŭ rekta linio tute ne povas vidi la pafilon. Tial la rusoj ĉe Wa-feng-goŝ estis dum horoj sub terura artileria pafado, tamen ne eĉ unufoje ekvidis japanan pafilon.

— HINDO

Internacia konferenco. — La ĉiutagaj gazetoj nune raportantaj pri kunvenoj en Parizo de la diversnaciaj komisiuloj esplorantaj la Hull'an okazon, estas aparte interesantaj por ni, esperantistoj. Ili ja longe priskribas la malhelpojn renkontatajn de la kompatindaj komisiuloj: unuj parolas angle, aliaj ruse, aliaj france; oni devis difini, ke ĉiu atesto estos farata per la nacia lingvo de l'atestanto kaj tradukata anglan kaj rusan. Simile kiam rusa komisiulo volas alparoli anglan, lia demando devas esti tradukata en du aŭ tri lingvojn, ktp. Neeviteble oni pensas, pri la facileco laŭ kiu okazas internaciaj kunvenoj de esperantistoj...

Tro bona! — Oni en Ĥinuĵo scias ironiadi sub formo de ĝentilegeco. Kiam aŭtoro sendis nepresindan manuskripton al gazeto, la redakcio skribas al li:

« Ni legis vian verkon kun plezurego. Ni ĵuras, ke neniam ĝis nun ni legis tiel bonegan ĉefverkon. Se ni enpresus ĝin, Lia Imperiestra Moŝto nepre ordonus, ke ni uzu ĝin modele kaj neniam en la estonto enpresu ion malpli bonegan. Sed ĉar tio ĉi certe ne okazus ĝis dek mil jaroj, ni resendas al vi, tremante, vian manuskripton, kaj dek milfoje petas vian pardonon... »

Por filatelistoj. — La francajn poŝtmarkojn de 1849-a kaj 1852-a jaro oni represigis dum 1862-a jaro, ĉu por pleniĝi la kolektaĵon de l'imperiestrido, ĉu por transdoni (kiel kelkaj opinias) al fremdaj oficejoj. Tiuj poŝtmarkoj, neuzitaj, valoras multe malpli, kompreneble, ol la originalaj neuzitaj, aĉetblaj nur po — kelkafoje — centoj da frankoj.

La gumo de la represaĵoj estas tre blanka, kaj ankaŭ tro glata pro mekanika almetiĝo. Tial la represaĵoj malsimilas la originalajn. Sed ĉefan malsimilecon montras la koloro: ĝi estas pli hela ĉe la represaĵoj, ĉar por tiuj ĉi oni uzis la kolorojn uzatajn por presigi la tiamajn poŝtmarkojn de 1862.

Nu! antaŭ kelka tempo oni malkovris friponaĵon uzitan por ke tiuj represaĵoj simulu la malnovajn poŝtmarkojn: oni vidis ke represitaj poŝtmarkoj estis bakigitaj en forno! Pro tio, ilia koloro estis malheligiĝinta, kaj tiam ili similas la aliajn.

Oni jam trovis, tiaj, la 10 ctm. bistran de 1852, kaj la 40 ctm. ruĝan de l'francaj kolonioj, kiu, tiam, estas ja kvaŭzaŭ poŝtmarko de l'Republiko de 1849. — Eble ekzistas aliaj; sed ĝis nun oni ilin ne rimarkis.

Filatelistoj, atentu kiam vi intencas aĉeti neuzitajn poŝtmarkojn francajn de 1849 aŭ 1852!

— P. B.



Logiko. — Malpacaj geedzoj iras ĉe la pastron. — *La edzo*: Via pastra moŝto, mi deziras eksedziĝi. — *La pastro* (al la edzino): Kaj vi, mia filino? — *La edzino*: Mi ankaŭ deziras eksedziĝi. — *La pastro*: Miaj gefiloj, kiam geedzoj estas tiel kunsentemaj, la eksedziĝo estas absolute nebla.

Distrite. — *Profesoro* (kiun oni ĵus prezentis al fraŭlino): Kiel fartas via edzo? — *La fraŭlino*: Mia edzo? sed mi estas ja fraŭlino! — *La profesoro*: Ha! Jes! mi forgesis!... Kredeble via estimata edzo ankaŭ estas fraŭlo...?

Diversaj argumentoj. — Nu, kia novaĵo? — demandas la bankiero de sia kontoristo.

— Du sinjoroj deziras pruntepreni monon de via sinjora moŝto. Nome, barono Hipotekoviĉ deziras dek mil rublojn.

— Hipotekoviĉ? Mi ne donas al li, ĉar mi *ne konas* lin.

— Cetere, grafo Malŝparowski...

— Malŝparowski? Mi ne donas al li, ĉar mi *konas* lin.

En la lernejo. — *La instruisto* : Diru al mi, Josefo, kiel alta estis la Babela turo? — *Josefo* : Mi ne scias. — *La instruisto* : Diru do vi, Kolomano. — *Kolomano* : Oni ne scias. — *La instruisto* (AL JOSEFO) : Hontu. Kolomano estas pli juna ol vi, kaj jen li scias.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

LA INTERNACIA DELEGITARO

por elekto de helpa lingvo.

Ĝiaj progresoj en 1904

La legantoj de *Lingvo Internacia* estis regule sciigataj dum la lasta jaro pri la senĉesaj progresoj faritaj de tiu ĉi grava entrepreno konata sub la nomo *Internacia delegitaro por elekto de helpa lingvo*, kiu, enkondukita de la *Internacia kongreso de Filozofio* en 1900, estas de tiu tempo lerte kaj ageme gvidata de S-ro COUTURAT kaj LEAU, ambaŭ aŭtoroj de *Histoire de la Langue Universelle*.

La diverseco kaj multeco de la ricevitaj aliĝoj necesigas, laŭ mia opinio, mallongan resumon por elstarigi la plej ĉefajn progresojn. Oni scias, ke la entrepreno de S-roj COUTURAT kaj LEAU konsistas en du apartaj sekcioj. Unu sekcio, — kiu estas la vera « delegitaro », klopodas kolekti aliĝojn de ĉiuspecaj kaj ĉiunaciaj grupoj aŭ societoj; tiuj societoj estas riprezentataj de unu aŭ kelkaj delegitoj, kiuj post kelkaj jaroj formos grandan aron celantan elekti unu artefaritan internacian lingvon kaj ĝin propagandi. Ĉar la tiama delegitaro riprezentos tre gravajn ĉiulandajn societojn, t. e. centmilojn da homoj, ĝia agado povos esti tre forta, kaj ĝi sendube prosperas alkonduki la ĉefajn eŭropajn registarojn sin okupi oficiale pri la demando.

Aliparte, por ebligi al apartaj personoj ankaŭ aliĝi al la movado en sia privata nomo (kaj ne kiel riprezentantoj de

grupo aŭ de societo) S-roj LEAU kaj COUTURAT entreprenis grandan internacian petskribon al la *Internacia Akademiaro*, por atingi ke tiu ĉi konsentu preni sur sin la elekton kaj la oficialan starigon de ia internacia artefarita lingvo. Tiu petskribo estas subskribebla de ĉiu persono apartenanta al profesoro aŭ al akademio.

Post tiu ĉi rememorigo pri la konsisto de la celata entrepreno, oni pli facile komprenos tion, kion signifas la subaj aliĝoj aŭ subskriboj.

En Germanujo la entrepreno ricevis plej grandan antaŭenpuŝon, dank' al agado de P-ro OSTWALD, la mondkonata kemiisto. Li tradukis unue kaj publikigis en *Annalen der Naturphilosophie* la francan broŝuron de S-ro COUTURAT *Pour la langue internationale*, kia verketo estas la plej bona enkonduko por esperantistiĝo, kvankam ĝi ne rekomendas apartan lingvon. Plie, membro de la *Scienca Societo* en Leipzig (kiu estas parto de la Internacia Akademiaro), P-ro OSTWALD ricevis subskribon de ses siaj kolegoj. En München, li faris ĉe la tiea sekcio de *Verein deutscher Ingenieure* grandan paroladon por la Delegitaro *) kaj eldonis ĝin ĉe la Stuttgart'a firmo FRANCKH. Tiu ĉi propagandilo disvendigis milkopie kaj jam atingis kelkajn eldonojn. La rezultato de tiu ĉi agema propagando montriĝis baldaŭ: gravaj societoj aliĝis al la Delegitaro, ekzemple *Deutsche Bunsen-Gesellschaft*, *Physikalischer Verein* (Frankfurt), *Kosmos* (Stuttgart, 4000 membroj), *Bayerischer Bezirksverein des Vereins deutscher Ingenieure* (München), *Elberfeld'a komerca ĉambro* (kiu monofaris por la entrepreno) k. a. k. a. Nun la movado rapide disvastiĝas tra tuta Germanujo kaj elvokis fondon de esperantista grupo en Frankfurto.

En Aŭstrujo, kiel jam scias miaj legantoj, P-ro HUGO SCHUCHARDT estis komisiita de la *Imperia Scienca Akademio* en Vieno por raporti pri la movado por internacia lingvo. En sia raporto, tradukita de S-ro SCHRÖDER en *Internacia Scienca Revuo* (n-ro 9, 1904), la fama filologo konkludis por la programo de la Delegitaro: « La vera problemo, li diras, la fina problemo, estas la jena: oni devas certigi al tiu lingvo, *eĉ se ĝi ne estas la plej bona*, absolutan monopolon... Mi esperas, ke mi ne transpaŝos la konvenon lasitan al mi, kiel raportanto, se mi aldonas, ke estas en la intereso de la Akademioj mem uzi la favoran tempopunkton por direkti kaj konduki al celo movadon, kiu laŭ ĉia antaŭvido ne iĝas refluigebla kaj

* Vidu la tradukon en « Internacia Scienca Revuo » n-ro 10, 1904.

kiu, post kelke da tempo, ankaŭ al la scienca komunikigo sin trudos ». Mi aldonos nenion al tiuj ĉi signifaj vortoj.

En Francujo ne malgrandiĝis la movado. Multegaj estas subskriboj ricevitaj por la petskribo. En Lyon, Marseille, Nantes, Rennes, Tunis, estas nove aliĝintaj societoj. En Parizo la *Société française d'Hygiène*, la *Société zoologique de France*, *l'Union coopérative des Sociétés française de consommation* (kiu unuigas 326 societojn) ankaŭ aliĝis. La *Havr'a komerca ĉambro* malavare monofervis. Fine, la Kongreso de *l'Association française pour l'avancement des Sciences*, en Grenoble, post raporto kaj proponoj de S-roj LAFARGUE kaj BOURLET, renovigis sian aliĝon al la Delegitaro kaj admonis la sciencajn societojn, ke ili mone helpu la entreprenon.

En Svisujo estas ricevita la aliĝo de *l'Institut national genevois* (sekcio de la naturaj kaj matematikaj sciencoj), de la *Franca komerca ĉambro* en Genevo kaj de la *Société sténographique* en la sama urbo.

En septembro okazis en Genevo la dua *Internacia kongreso de Filozofio*; ĝi estis okazo por granda sukceso. S-ro COUTURAT raportis, kiel delegito de la unua kongreso (Parizo, 1900) pri la progresoj faritaj. La kongreso denove aprobis la ideon, reelektis S-ron COUTURAT kaj elektis duan delegiton, P-ron STEIN, el Berno; ĉio ĉi okazis unuanime. La unua sekvo estis aliĝo de la *Société française de Philosophie*, kiu elektis P-ron BERGSON, membron de la Franca Instituto.

En Belgujo estis ricevata aliĝo de multaj societoj kaj kvardek novaj subskriboj, inter ili la subskriboj de sep membroj de la *Reĝa Akademio*. La scienca fako de tiu ĉi akademio alprenis decidon favoran por la ideo de helpa lingvo, post raporto de generalo DE TILLY, kiu tiavorte konkludis: « La movado por helpa lingvo internacia estas hodiaŭ tiel bone organizita kaj gvidata ke nenio kapablos ĝin haltigi aŭ maltrafigi. La lingvo internacia elstarigos; sed ĝi povos stariĝi kun helpo aŭ sen helpo de la Akademioj. Estas evidente dezirinda, en intereso de la scienco kaj de la akademioj mem, ke ili havu en tiu ĉi starigo sian konvenan partoprenon. Ilia honoro iamaniere enligiĝis. »

La slavaj universitatoj alsendis kelkajn aliĝojn, inter ili la *Katolika Imperia Akademio* en Peterburgo. Ankaŭ estas ricevitaj en Hungarujo subskriboj de profesoroj ĉe la *Kolozsvár'a Universitato*, aparte de du membroj de la *Hungara Scienca Akademio*. El Praha estas ricevitaj subskriboj de kvar membroj de la *Scienca Akademio*. La entrepreno en Bohe-mujo estis tre helpata de S-ro HOLUB, kiu proprelspeze eldonis la « Deklaracion » (programon) de la Delegitaro kaj « El-

tiraĵon » de la tabelo de la jam aliĝintaj societoj (bohema traduko de S-roj KHUN kaj WALD).

En Skandinavaj landoj la propagando komencas alporti kelkajn rezultatojn; en Svedujo estis kelkaj aliĝoj.

Portugalujo sendis sian unuan aliĝon, tiun de la *Societo de Medicinaj Sciencoj* en Lisabono. Tio ĉi estas bona antaŭsigno tuj antaŭ la proksima internacia kongreso de Medicino. En Italujo estas ricevataj multegaj subskriboj. En Suda Ameriko, aparte en Peruo kaj en Argentino, S-roj VILLAREAL kaj DASSEN elvokis rimarkindan progresadon.

En Londono okazis la dua kunveno de la *Internacia Akademiaro*. Kiel oni private sciigis, oni ne provis prezenti ankoraŭ la demandon pri enkonduko de internacia lingvo. Tiu ĉi Akademiaro povas alpreni proponon, nur se la projekto estas subtenata de la plej multo de la aliĝintaj Akademioj, t. e. dek Akademioj. La progresoj ne estis ankoraŭ sufiĉe grandaj, por certigi la venkon, kaj tiaj proponoj devas esti farataj, nur kiam oni estas certa pri la venko.

* * *

Oni rimarkos eble, ke Anglujo liveris tre malmulte da aliĝoj — escepte tiun de P-ro W. RAMSAY — kvankam la propagando de Esperanto faris en tiu lando grandegajn progresojn. Tio ĉi estas stranga kaj bedaŭrinda. Mi scias, ke multaj personoj vidas en la Delegitaro nur senutilan superfluan entreprenon kaj opinias: « ĉar Esperanto sukcesas, ni ne bezonas serĉi alian vojon ». Laŭ mia opinio, tio ĉi estas absolute malprava. Unue, ni devas uzi ĉiujn armilojn renkontatajn; due, oni ne povas nei, ke la agado de la Delegitaro ebligas alkonduki al nia afero personojn jaŭ societojn, kiuj ne volus aŭ ne povus ankoraŭ nun publike aliĝi al Esperanto: ĝi do antaŭpretigas al ni la vojon; trie, ni riskas post kelka tempo trovi antaŭ ni — se ni malzorgas la Delegitaron — potencajn organizaĵojn, kun kiu oni devas kalkuli. Mi do pensas, ke la plej saĝa konduto en nia propra intereso kaj en la intereso de nia ideo estas helpi per ĉiuj niaj fortoj al la agado de la Delegitaro kaj aliĝi grandamase al ĝi, tiamaniere, ke ĝi konsistu plej grandaparte el fervoraj esperantistoj: tiel ni estos certaj pri la boneco kaj sendanĝereco de ĝia agado.

Se ni precizigas la rezultatojn de la eksteresperantista propagando, ni trovas 724 subskribojn en novembro 1904 (anstataŭ 429 en novembro 1903) kaj aliĝon de 25 novaj societoj, reprezentantaj milojn da membroj. Kvankam tiuj ciferoj ne estas absolute grandegaj, tamen ili estas kompare gravaj; se ni, esperantistoj, firme aliĝus al la Delegitaro, ni

rapide farus ĝin granda kaj potenca; ni precipe atingos tiun ĉi rezultaton, ke ĝi fariĝus tre baldaŭ internacia kaj povus tial komenci prilabori serioze la demandon.

La aliĝoj povas esti ricevataj nur per buŝa kaj persona agado. Al ĉiuj, kiuj kredas, ke tiu entrepreno estas utila aŭ atentinda, mi diras do: Propagandu ĉe ĉiuj societoj, sciencaj, profesiaj, komercaj, k. t. p. Tiuj societoj, kiuj ne volus aliĝi al Esperanto, multe pli facile kaj eĉ volonte aliĝos al la principo de internacia artefarita lingvo, *kiun ili devos lerni nur post komuna konsento*. La kondukantoj de la entrepreno estas ĉiam pretaj sendi la necesajn dokumentojn al la personoj, kiuj volas helpi ilian agadon; sufiĉas sin turni al ili senpere aŭ tra la redakcio de « L. I. ». Oni disvastigu ĉirkaŭ si la ideon per paroladoj, gazetaj artikoloj, aŭ simple per interparoloj aŭ per leteroj. Oni iafaje traktu, en babilado, nian gravan aferon anstataŭ sensignifajn temojn: ne sufiĉas *in petto* deziri progreson, sed oni devas ĝin *voli*, ĝin prilabori senĉese kaj senlace.

OTTO LAMM

...

P. S. — Oni kunlaboras la entreprenon de la « Delegitaro »:

1-e: Diskonigante ĝin diversmaniere;

2-e: Instigante ĉian ajn sciencan, societan, komercan societon, ĉian ajn grupon interesatan pri alprenado de internacia lingvo, ke ĝi elektu delegiton;

3-e: subskribante, se oni estas membro de akademio aŭ profesoro ĉe ia Universitato, la *Internacian Petskribon al la Akademioj*, aŭ kolektante subskribojn de siaj kolegoj aŭ konatuloj;

4-e: Elvokante apartajn aŭ arajn monferojn. La adreso de la kasisto, S-ro COUTURAT, estas: 7, *rue Pierre-Nicole, Paris, V^e*. Monferante ĉiujare almenaŭ kvin frankojn, oni ricevas ĉiujn dokumentojn eldonatajn de la Delegitaro.

MOVADO ESPERANTISTA

Por niaj novaj abonantoj kaj responde al kelkaj leteroj ni devas sciigi, ke la informoj ordinare kronikataj sub tiu ĉi titolo devis prokrastigi de kelka tempo pro la reorganizo de nia gazeto. Sed ni rekomencos ilian regulan eldonon kune kun nia proksima numero. Hodiaŭ, pro multeco de la enpresataj artikoloj, ni povas nur sciigi, ke nia lingvo faris grandan antaŭenpaŝon en Polujo, kie, post fondo de Varso-

via Grupo Esperantista, la poŝta administracio sciigis oficiale ĉiujn poŝtajn kontorojn, ke Esperanto estas **de nun uz-
ebla, kiel telegrafa lingvo**. Tiu ĉi oficiala akcepto de nia lingvo en poŝta-telegrafa administracio estas verŝajne la unua ĝis nun okazinta.

La Redakcio

Letero de Doktoro Zamenhof.

En la n-ro 3 (111) de «Lingvo Internacia», paĝo 63, mi legis kun miro la sekvantajn vortojn: «Unu el la plej belaj (tradukoj de S-ro Grabowski), *Virineto de l' Maro*, eĉ jam reaperis lastan jaron en... sed, ŝŝtt!!... Sekreto estas ĝi...»

Mi devas antaŭ ĉio klarigi, ke la «*Virineto de l' Maro*» estis tradukita ne de S-ro A. G., sed de *mi mem* (ĝi estis presita en la «*Esperantisto*» sub la pseŭdonimo «*Anna R.*»). S-ro Legamulo sekve faris eraron, sed kontraŭ tiu ĉi eraro mi nenion havas kaj mi certe nenion skribus pri ĝi. Sed mirigis min la *sekreto*, kiun S-ro Legamulo faris el la fakto de la reapero de tiu rakonto en mia «*Krestomatio*». El tiu ĉi ŝajna sekreteco kaj el la misteraj esprimoj kaj punktaro, uzitaj de S-ro Legamulo, la legantoj povas konkludi kvazaŭ la represo de la rakonto estis ia krimo, pri kiu oni devas silenti!! Tio ĉi devigas min klarigi, ke la rakonto reaperis ne «*ŝŝtt*»..., sed tute publike en mia *Krestomatio* kaj tio ĉi tute ne devas esti ia sekreto.

L. Zamenhof

DIVERSAĴOJ

Spiono — spionanto. — En la dua numero (15-an de januaro) de «Lingvo Internacia», sur la paĝoj 41-a kaj 42-a mi legis rimarkojn pri la radiko «*spion*». Ĉar unu mia verko estas citita kaj prenita kiel apogpunkto, la afero estas sama, laŭ bona justeco, kiel se mi estus nomita. Tute ne juĝante

la opinion de la subskribinto, kiu tre certe havas la rajton pensi kaj skribi kiel li volas, mi venas nur diri, — por ŝirmi mian respondecon —, ke donante al la radiko « spion » la unuan sencon *espion*, mi imitis la « Universalan Vortaron » kaj donante al ĝi la duan sencon *espionner*, mi imitis la « Plenan vortaron por Rusoj » (paĝo 228-a), kie la du signifoj troviĝas unu sub la alia. Cetere la verko citita estas ekzamenita kaj aprobita de D-ro Zamenhof, kiu, mi tre kredas, pripensis antaŭ ol doni aŭ konfirmi la modelojn, kiujn mi imitis.

L. de Beaufront

Cikado, cigado, cikalo. — Neniu el tiuj 3 vortoj cititaj en antaŭaj numeroj de L. I. estas pravigata.

D-ro Zamenhof en la « Universalan Vortaron » precize sekvas la regulon elekti por naturhistoriaj vortoj radikojn formitajn el la internacie akceptitaj latinaj esprimoj aŭ signoj.

Cigale estas *Gryllus campestris* kaj tial la esperanta radiko « gril » formiĝas.

Vi trovos ĝin en la « Universalan Vortaron ».

La germana vorto *Grille* estas la sama, kiel la franca *cigale* : « Die Grille und die Ameise » (fablo).

Herb. F. Höveler

Goeto : historio de tiu vorto estas interesa : ĝi estas etiga formo latina de *kimria* vorto *guil, goil, goel*, kiu signifas *laro* (goëland, laro). « Goel-eto » signifas sekve « malgranda laro, mevo », kaj per komparo « ŝipo rapida kiel mevo ». Tiel nia lingvo havas radikojn en ĉiuj lingvoj estintaj sur la tero.

P. B.

KOMUNIKAĴOJ

De la **Bordeaux'a grupo** ni ricevis sekvantan leteron :

Ni sciigas al vi, ke, tiun ĉi jaron, granda federala festo de gimnastiko okazos en nia urbo. Ni volonte konatiĝus kun la fremdaj esperantistoj, kiuj partoprenos en ĝi kaj ni volonte gvidos ilin en nia urbo laŭ nia tuta povo.

J. Bignié, ingeniero.

66, Cours Gambetta, Talence (Gironde), — aŭ : 2, Cours Pasteur, Bordeaux.

Esperanta Hejmo. — Pastro Fr. Schneeberger, prezidanto de la « Svisa Esperantista Societo », sciigas nin, ke li intencas fondi *Esperantan Hejmon*, kie povos gastadi junuloj diverslandaj. Se eble li prenos nur unu el unu lando samtempe, ke la interparoladoj povu ĉiam esti internaciaj. Li precipe sin okupos pri la buŝa instruado de Esperanto kaj diversaj aliaj lernindaĵoj se oni deziras, kiel ekzemple Esperantan stenografion, k. a.

Certe tiu ĉi ideo estas bonega kaj rekomendinda, kaj ni ne dubas, ke ĝia efektivigo en bela turista lando, Svisujo, tre helpas al ĝia sukceso.

Problemoj

13. (De pdl.) — 8, 4, 3, 9 : birdo malsovaĝa. — 12, 2, 10, 4 : frukto bongusta. — 12, 14, 11, 16, 15 : malsano. — 10, 13 : sovaĝa besto. — 1, 8, 9 : aero. — 7, 3, 5 : fiŝo. — 4, 8, 15; 12, 14, 6, 5; 7, 6, 4, 10; 13, 14, 12; 10, 4, 1; 9, 3, 4, 7; 2, 6, 4 : partoj de l'homa kaj besta korpoj. — 12, 6, 2, 9, 16, 4 : homa estaĵo. — 12, 11, 16, 9, 6, 2 : bona rezultato. — 1, 13, 14, 15 : koloro. — 12, 8, 11, 14, 15, 3, 7, 13, 10, 12, 16 : Esperantista Societo. — 5, 6, 9, 14, 5, 6, 11 : vira baptonomo. — 8, 9, 12, 3, 13, 3, 1 : kreskajo manĝebla. — 9, 14, 2, 14, 4, 1 : bonodora printempa floro. — 1—16 : Solvu tiun ĉi problemon : vi vidos grandegan surprizon.

14. (De H. M. DECULO.) — Mi estas aŭ senpieda, aŭ unupieda, aŭ dupieda. Disduigu min : mi fariĝos kvarpieda.

15. (De H. R.) — Mia vivo estas mallonga. Ŝanĝu miajn vokalojn : vi pli ol kvardek milobligos mian vivon.

La solvojn de tiuj ĉi problemoj ni presos en nia 9-a numero, kune kun la nomaro de la divenintoj. Solvoj de la problemoj trovataj en nia 1-a numero : 1. Mara naŭzo. — 2. Mara naŭzo (ni ricevis kelkajn solvojn « paralizo », dirantaj ke la 5-a vorto estas « l'ajlo » — ni akceptis ilin kiel ĝustajn; kredeble la solvintojn konfuzis ke « aŭ » estas kalkulata kiel unu *sono*). — 3. Lup' — pul'.

Divenis (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj) : Maurice David 1, 2, 3, N. Markovskij 3, A. Roullin 1, 2, 3, H. R. 2, 3, M. Koneczny 2, S-rino M. Bastoul 2, 3, P. Hedström 2, 3, S-rino Caroline Wieslander 1, 2, 3, Pedagoĝo 1, 2, 3, H. Rjahovski 2, Józef Lapiński 3, Stanislav Banik 2, 3, H. Willke 3, Molnár Gyula 2, 3, E. Mathys filo 2, 3, Ed. Kúhal 2, 3, D-ro G. Philippet 2, 3, A. Cetano Coutinho 1, 2, 3, Josefo Miletz 2, 3.

Kvaronjare ni lotos premiojn inter abonantoj, kiuj estos sendintaj plej multajn ĝustajn solvojn.

Redaktoro (gérant) : **Paul Fruictier**. Administranto-direktoro : **Paul de Lengyel**.

Presejo Esperantista, 33, Rue Lacépède, Paris.